

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

FORTA BULGARA
PARTOPRENO

EN AMIKA
ETOSO

E-VOĈOJ EN
MOSKVO

KUN JUNULARA
LABORIMPETO


NE ESTAS DU
BULGARIOJ

HONORE AL
G. ĜAGAROV

AMIKO DE
INFANOJ



FORTA BULGARA PARTOPRENO EN AŬGSBURGO



Aŭgsburgo. Ĝenerala vidaĵo.

2000-JARA AŬGSBURGO — KONGRESURBO DE LA 70-a UK DE ESPERANTO

La 4-an de aŭgusto 1985 frumatene grupeto da bulgaraj esperantistoj marŝis laŭ Maximilian-strato (la antikva romia „Via Claudia“). De ĉiuj flankoj aŭdiĝis la kanto de dekoj da sonorilejoj de la preĝej- kaj horloĝturoj de malnova Aŭgsburgo. La suno jam leviĝis super la akrapintaj tegmentoj de la solene ornamitaj per flagoj kaj florgirlandoj diverse kolorigitaj domoj en tipe bavara arkitektura stilo. Ĝi lumigis la turojn de la malnova katedralo, de la preĝejo Sankta Ulriko, la faman Perlach-turon antaŭ la Urbodomo. Ni preterpasis la fontanon sur la urbodoma placo kun la statuo de la romia imperiestro Augustus, fondinto de Aŭgsburgo antaŭ 2000 jaroj. Ĉie vidiĝis postrestaĵoj de la romianoj. Eĉ la „strobilo“¹ en la urba blazono kaj titolo de la kongresa kuriero (temas pri la kongresa gazeto!) estas romia postrestaĵo. Kaj en la urbocentra piedira kvartalo la malnova kaj la moderna arkitekturo bonege kuniĝas en la mirinde belan ensemblon de nuntempa Aŭgsburgo.

Dum la jarcentoj la antikva romia fortikaĵo el tekmetiista centro transformiĝis en modernan industriurbon kun paperfabrikoj, presejoj, nutraĵproduktadaj uzinoj, bierfarejoj, elekt-

rostacioj, maŝinfabrikejoj k. a. Ĉi tie troviĝas la famaj en la tuta mondo uzinoj „MAN“, kie oni produktas dizelajn motorojn laŭ la nomo de ilia inventinto ing. Rudolf Diesel, naskita en Aŭgsburgo. La mondfama verkisto Bertolt Brecht, aŭtoro de la rakonto „La Aŭgsburga kretociklo“, kies scenejan version kun granda sukceso prezentis la Bulgara Esperanto-Teatro dum la kongrestagoj, ankaŭ estas aŭgsburgano. Multaj artaj, kulturaj kaj sportaj vidindaĵoj altiras milojn da turistoj el la tuta mondo al Aŭgsburgo — la tria laŭ grandeco urbo en Bavario kun ĉirkaŭ 250 mil loĝantoj.

Pli ol 600 pontoj kaj pontetoj (Venecio havas proksimume 250!) kunligas la bordojn de la riveroj Leĥ kaj Vertaĥ kaj de la multnombraj kanaloj, kies akvo ankaŭ hodiaŭ estas grava energidonanto al diversaj fabrikoj.

Ni trairas la krucvojon Königsplatz en la urba centro kaj direktiĝas al la kongresejo, situanta ĉe artefarita lageto en la belega parko Witelsbacher, malantaŭ kiu leviĝas la 35-etaĝa Holiday Inn — la plej alta turhotelo en Eŭropo.

LA SOLENA INAŬGURO

En la grandega sporthalo de la kongresa komplekso en ĉeesto de pli ol 2300 kongresanoj kaj gastoj okazis la solena inaŭguro de la 70-a UK de Esperanto.

La ĉefurbestro de Aŭgsburgo Hans Breuer per tre afablaj vortoj bonvenigis la kongresanojn kaj esprimis sian miron, ke en la kongresa salonego „li estis la sola persono, kiu bezonas interpretiston“. Tian problemon ne havis la partoprenantoj en la Infana E-Kongreseto, kiuj poste salutis siajn gepatrojn. Diplomatiuj reprezentantoj de pluraj landoj (Aŭstrio, Ĉinio, Danlando, Hungario, Italio, Usono, k. a.) parte en Esperanto, salutis la kongresanojn.

Prof. d-ro Humphrey Tonkin tre lerte eksplikis la kongresan temon, ĝian signifon por Esperanto, por Aŭgsburgo kaj por la tuta mondo kaj per tio metis bonan bazon por la dumkongresaj diskutoj. Poste mag. William Auld prezentis pli detalajn aspektojn de la kongresa temo „Antikvo kaj moderno — kion ŝangi, kion konservi?“

Orkestro kaj koruso faris sian kontribuon al la bonega internacia etoso per plenumo de „Himno al la paco“ kaj subteno de la komuna kantado de „La Espero“.

La saman vesperon kongresanoj kaj gastoj ĝuis riĉan kaj varian „nacion programon“, en kiu sin prezentis vere talentaj plenumantoj de bavaraj popolkantoj kaj dancoj.

¹Strobilo — konusforma fruktaro ĉe la pliparto de la pinglarboj — Noto de la Red.



REZOLUCIO

de la 41-a kongreso de Bulgara Esperantista
Asocio okazinta la 6-an de julio 1985 en Sofio

La asocio de bulgaraj esperantistoj aperas antaŭ sia 41-a kongreso — unuiginta kaj solidara kun la Lenina aprila politiko de la Bulgara Komunista Partio, pliiĝinta siajn vicojn per centoj da junaj aktivuloj, kun propra kontribuo al la spirita kaj soci-politika vivo de la lando, kun ĉiam pli kreskantaj aktiveco kaj aŭtoritato en eksterlando.

Dum la raportata periodo la tuteca agado de BEA estis direktita al sukcesa solvo de la bazaj taskoj, kiujn starigis antaŭ la publikaj organizaĵoj la XII kongreso de BKP, la Nacia Partia Konferenco, la Februara kaj Marta Plenkunsidoj de CK de la partio. La Centra Estraro de BEA kaj ĝia Buroo efektivigis multajn iniciatojn, kiuj kontribuis por plua aktiva altiro de la esperantistoj al la laboro por pozitivaj ŝanĝoj en la vivo kaj en la konscio de nia popolo.

Favore efikis sur la laboron de la esperantistoj la proksimiĝanta 100-jara jubileo de Esperanto, kiu feliĉe koincidas kun la 80-jariĝo de BEA.

Inter la 40-a kaj 41-a kongresoj de nia Asocio estis disvolvita aktiva agado favore al la interkompreniĝo kaj fido inter la popoloj, por firmigo de la paco en la mondo.

Konstante pliriĉiĝas la organiza vivo de la Asocio, pli gravan lokon inter la agadformoj okupas la konferencoj kaj la seminarioj. Plivastigis la kunagado kun la ceteraj publikaj organizaĵoj kaj antaŭ ĉio kun la Patrolanda Fronto, Komsomolo, la packomitatoj k.a.

Por ke la taskoj, starantaj antaŭ la Asocio, estu sukcese solvitaj, la kongreso

DECIDIS:

1. La Bulgara Esperantista Asocio senĉese strebu al ankoraŭ pli intima unuiĝo de la esperantistoj el ĉiuj generacioj surbaze de la aprila linio de la Partio. Gi turnu ankoraŭ pli grandan atenton al plialtigo de la nivelo de la ide-
eduka laboro en ĉiuj asociaj ĉeneroj.

2. Surbaze de la postuloj de la Februara Kunsido de CK de BKP (1985) estu reorganizita la laboro de ĉiuj asociaj ĉeneroj kaj aparte la ekonomia agado. Por plialtigi la kvaliton de siaj aktivecoj, BEA plibonigu la stilon, la metodojn kaj la organizan stabiligon je ĉiuj niveloj. La Centra Estraro de BEA enkonduku komputeran teknikon en sian laboron.

3. La Centra Estraro pli intime observu kaj helpu ĉiujn distriktajn estrarojn, insiste postulante aplikadon de kolektiva metodo kaj laŭplana principo en ilia laboro, regulan raportadon kaj kontroladon de plenumo de la starigitaj taskoj. CE de BEA speciale zorgu pri plialtigo de la publika agadkapablo de la societoj kaj donu konkretan helpon al la malfortaj societoj por ilia organiza kaj idea elkresko; oni devas ne nur fondi novajn societojn, sed ankaŭ plenigi ties agadon per riĉa kaj aktuala enhavo. La Estraroj klopodu altiri agemajn kaj iniciatemajn esperantistojn, kiuj altiru la lernejan junularon al la sekcioj de la kluboj de internacia amikeco en la lernejoj kaj tiel kontribuu ankaŭ por pliriĉigo de la komsomola agado.

4. CE de BEA sisteme klopodu aktivigi la laboron de la sekcioj de BEA. La ne-vivokapablajn sekciojn oni unuiĝu kun parencaj sekcioj. Oni kuraĝigu la fondon de grupoj kaj kluboj laŭ intereso, por ke Esperanto penetru en novajn profesiojn kaj agadsferojn. Niaj estraroj subtenu bonajn kontraktojn kaj ligojn kun la organizaĵoj de la Scienc-Teknika Unuiĝo, kunlaboru kun ili.

5. CE de BEA organizu pli efikan informan kaj propagandan laboron pri Esperanto kaj la E-movado, aparte inter la junularo kaj la laborista klaso. Por tiu celo estu utiligataj ankaŭ la naciaj radio kaj televido.

6. CE de BEA komencu eldonadon de bulgarlingva kaj esperanta informbultenoj, spegulantaj la ĉefajn momentojn de la laboro kaj atingoj de BEA. La bulgarlingva bulteno estu

disvastigata inter gvidaj personoj kaj aktivuloj de nia soci-politika kaj kultura vivo, en lernejoj, sciencaj institutoj, transporto ktp., kaj la esperantistan bultenon oni sendu al alilandaj E-asocioj kaj E-redakcioj.

Estu eldonita informa broŝuro pri la esenco de Esperanto kiel lingvo kaj pri ĝia aplikado en diversaj sferoj de nia vivo kaj laboro, pri la celoj kaj taskoj de la E-movado.

CE de BEA eldonu grandkvante propagandilojn de Esperanto: diversajn afiŝojn, sloganojn, pensojn de eminentuloj pri Esperanto; E-insignojn, flagetojn, poŝtkovertojn ktp. Ĝi eldonu poŝtmarkon lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto.

CE de BEA preparu transporteblan ekspozicion, kiu migru tra la tuta lando laŭ difinita plano.

7. En la sfero de instrulaboro la E-organoj klopodu starigi rektajn kaj konstantajn ligojn kun la klerigaj instancoj, bonrezulte kombinante la socian kaj la ŝtatan principojn.

Oni faru energiajn paŝojn por malfermo de E-kurso per la radio aŭ la televido, por organizo de E-instruado en ĉiuj superaj lernejoj, kiuj preparas pedagogojn. Esperanto estu akceptita kiel elektelebla dua fako far la studentoj. Oni faru paŝojn ankaŭ por organizo de E-instruado en ĉiuj fakultatoj pri sociaj sciencoj.

8. Estu ellaborita programo por postdiploma kvalifikigo de jam diplomitaj E-instruantoj. Tiun formon trapasu ĉiuj ĝisnunaj diplomitoj.

9. La E-estraj estu pli postulemaj ĉe elekto de E-instruistoj por la lernejoj. Ili devas esti diplomitaj kiel instruistoj de Esperanto. Nur escepte, kaj por ne pli ol unu lernojaro, kandidato fininta sukcese la III-an gradon estu nomita E-instruisto en lernejo.

La distriktaj kaj societaj estraroj helpu morale kaj materiale perspektivajn kandidatojn por E-instruistoj. Oni transiru al la praktiko de kontraktoj kun ili, laŭ kiuj la kandidatoj sin devigas post la diplomigo instrui almenaŭ 5 jarojn Esperanton en lernejoj aŭ en civitanaj kursoj.

10. La kongreso postulas de la asociaj membroj pli bone posedi Esperanton, partoprenante diversajn formojn kaj gradojn de perfektigado.

CE de BEA organizu la eldonadon de sufiĉa kvanto da lernolibroj por diversaj aĝoj, samkiel regulan eldonadon de soci-politika, belarta kaj popular-sciencia literaturo.

11. Oni pli intense organizu la kvalifikigon de la aktivularo kaj la preparon de tradukistoj kaj kunlaborantoj por la E-gazetaro.

12. CE de BEA kaj la distriktaj estraroj turnu pli da atento al la laboro por plialtigo de la nivelo de la amatora artaktivado. Sur tiu kampo oni eklaboru kune kun la Centro de Amatora Artaktivado.

13. Oni plilarĝigu la kunagadon kun la ceteraj soci-politikaj organizaĵoj — unualoke kun la Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj,

turistaj societoj, organizaĵoj de la Ruĝa Kruco, la Komitato de Balkana Kunlaborado kaj Interkomprenigo, la packomitatoj, la popolaj legejoj kaj kulturdomoj ktp. Ni enkonduku Esperanton en tiujn organizaĵojn kaj komitatojn.

14. CE de BEA plu popularigu nian socialisman kulturon kaj arton en eksterlando per sendado de artistaj grupoj, prelegantoj, E-instruistoj k.a. Ĝi helpu la novajn E-organizaĵojn en Afriko, Azio kaj Latinameriko.

15. CE de BEA komencu eldonadon de interna bulteno, kiu fariĝu tribuno de la pozitivita sperto de nia E-movado en la kulturkleriga, ide-dukita, instrua, organiza kaj ekonomia agado.

16. La asociaj gvidantaroj — Centra, distriktaj, societaj, sekciaj — manifestu konstantan intereson pri la produktada kaj ofica laboro de la esperantistoj en entreprenoj, kamparmastrumoj, transporto, sciencaj institutoj, lernejoj ktp., popularigu ties atingojn kaj distingojn inter la esperantistoj, samkiel inter la neesperantista publiko.

17. Oni kuraĝigu la organizon de internaciaj esperantistaj laborbrigadoj en nia lando, precipe de la kamparmastrumo, bonkonstruado de loĝlokoj k.a. La laboro en tiuj brigadoj estu bone organizita, por ke ili transformiĝu en lernejojn de edukado en spirito de laboramo kaj civitanaj virtoj, en spirito de vera patriotismo kaj internacismo, pacamo kaj humanismo.

18. Oni plimultigu la zorgojn de la ekonomiaj organizoj de BEA por produktado nur de bonkvalitaj varoj kaj por farado nur de altkvalitaj servoj al la loĝantaro.

19. CE de BEA plibonigu la kontaktojn kun tiuj medioj de la monda E-movado, kiuj partoprenas la kontraŭmilitan movadon kaj la batalon por malebligo de termonuklea milito kaj militarismo de la Kosmo.

20. CE de BEA kaj la distriktaj estraroj faru ĝustatempe ĉion necesan por estigo de bona soci-politika etoso en ĉiu asocia ĉenero.


21. La kongreso de BEA estu gravaj eventoj en la asocia vivo, potenca antaŭenpuŝo por plivastigo de ĝia agado serve al la popolo, por mobilizo de la esperantistoj por aktiva partopreno en la konstruado de evoluinta socialisma socio en nia lando. La kongresoj de BEA estu aŝerplenaj kaj altnivela organizitaj, kiaj estas la kongresoj de la ceteraj soci-politikaj organizaĵoj en nia lando.

22. La 41-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio esprimas sian konvinkitecon, ke la membroj de la Asocio digne plenumos la taskojn, kiuj sekvas el la decidoj de la Februara kaj Marta Plenkunsidoj de CK de BKP (1985). Ili laboros entuziasme kaj persiste por finkonstruo de la materiala-teknika bazo de la matura socialismo, kun kreofaraj ili renkontos la XIII kongreson de BKP kaj fardonos ĉiujn siajn fortojn por efektivigo de la decidoj, kiujn ĝi prenos.

FORTA BULGARA PARTOPRENO

EN AŬGSBURGO

(daŭrigo de p. II)



La kongresejo

LA BULGARĜOJ AKTIVADIS...

En la abunda je aranĝoj kongresa programo — kunsidoj, diskutoj, ekskursoj, preskaŭ ĉie oni povis vidi en la unuaj vicoj niajn samlandanojn aktive partoprenantaj. Aparte bone sin prezentis niaj esperantistoj medicinistoj, instruistoj, ekoloĝoj, filologoj.

Specialajn prelegojn dum la kunveno de la Virina Komisiono faris niaj samlandaninoj Belka Beleva kaj Lili Koleva, kiuj forte impresis la ĉeestantojn.

Pli ol 50 ĵurnalistoj, fotistoj kaj filmistoj el diversaj landoj ĉeestis la kunvenon de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA) kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Amatoroj (ILEF), gvidataj de la prezidanto de TEJA Walter Haberl (Aŭstrio) kaj de la prezidanto de ILEF Donĉo Hitrov. Estis pridiskutitaj planoj havigi al E-ĵurnalistoj profesie verkitaĵojn materialojn kaj starigi kune kun la Internacia Gazetara Servo (IGS) ĉe UEA Internacian Esperanto-Infomagejton. UEA komisiis Donĉo Hitrov (Bulgario), Roman Dobrzynski (Pollando) kaj d-ron Ulrich Lins (FRG) krei 16-milimetran koloran dokumentan filmon pri la 100-jariĝo de Esperanto, kiu devas esti prezentita dum la Jubilea UK en Varsovio, 1987. La jarkunveno elektis nian samlandaninon Veneta Baleva kiel sekretariinon de ILEF.


Grandan sukceson havis la spektakloj de la Bulgara Esperanto-Teatro, gvidata de Kunĉo Vălev, kiu ludis vere elstare sub la reĝisorado de la merita aktorino Gertruda Lukanova. La teatraĵoj „Aŭgsburga Kretocirklo“ (laŭ la rakonto de Bertolt Brecht) kaj „Tri viroj en la neĝo“ de Erich Kästner provokis la ŝtormajn aplaŭdojn de la multnombra internacia publiko kaj pruvis la bonegajn kvalitojn kaj la kapablojn de niaj aktoroj-geesperantistoj ludi antaŭ tia postulema publiko. La „Aŭgsburga Kretocirklo“ estis prezentita ankoraŭ dufoje — laŭ la deziro de la publiko.

La ĵurnalo „Augsburger Zeitung“ de la 7-a de aŭgusto j. k. tre laŭde eĥis al la sukceso de BET:

„La „Augsburga Kretocirklo“ de Brecht sendube estis la kulmino de la Tago de la Paco dum la 70-a UK de Esperanto en Aŭgsburgo. La Bulgara Esperanto-Teatro prezentis la adaptitan de Werner Frisch dramon, kiu forte emociis la spektantojn... Ĉiuj roloj estis bonege plenumitaj kaj tute merite ŝtorme aplaŭditaj de la internacia publiko...“

Ne malpli grandan sukceson havis niaj kantartistoj Galja Kostova el la Stata Muzika Teatro de Jambol, Jana Cikalova el la Nacia Operteatro de Ruse, niaj fame konataj kantistoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov. Ne nur pro patriotismaj sentoj mi povas aserti, ke niaj kantartistoj estis la pintoj de la Internacia Muzikprogramo. Iliaj plenumoj montris vere altan muzikan klason!

Ankaŭ ĉi-foje la konata ĥorestro Dimităr Terziev sukcesis organizi internacian koruson, kiu sin prezentis en la improvizita arta programo sur la urba placo.



Sceno el la teatraĵo „Aŭgsburga kretocirklo“, prezentita de la Bulgara Esperanto-Teatro

Apartan intereson ĉe la kongresanoj vekis la malgranda ekspozicio de kolorfotajoj pri la Internacia E-Kursejo en Pisanica, aranĝita en la koridoroj de la Kongresejo.

LA MONDA PACO — ZORGO KAJ DEVO DE ĈIU ESPERANTISTO

La konservo de la monda paco, la kunlaborado inter homoj el landoj kun diversa sociordo — tiuj ja estis la du gravaj kaj ĉefaj temoj de la 70-a UK de Aŭsburgo, kiuj engaĝis la atenton de la kongresanoj. Por unua fojo LKK kaj UEA okazigis Tagon de la Paco enkadre de la Kongresa Programo, lige kun la 40-a datreveno de la atombombado al la japanaj urboj Hiroŝimo kaj Nagazaki. LKK konsideris la fakton, ke la okazigo de speciala Tago de la Paco koincidas kun la tradicia jam de jaroj Pacofesto en Aŭsburgo kaj tre lerte sukcesis kunordigi tiujn pacmanifestaciojn. En la centro de la Tago de la Paco, estis la Ludo de la Paco, laŭ la verko de Bernard Benson, prezentita de gelernantoj, kiuj speciale por la UK lernis Esperanton. Al tiu prezentaĵo aliĝis la monda premiero en Esperanto de „Aŭsburga Kretocirkló“ fare de BET, kiu ankaŭ traktas la paco-problemon en la individua, interhoma sfero. Mirigas la fakto, ke tiun teatraĵon ĝis nun oni ne prezentis en Germanio.

En la kunsido de la MEM-komisiono, kiel sekretariino de MEM estis elektita nia samlandanino Vasja Cvetkova kaj kiel respondeca administranto de revuo „Paco“ — k-do Metodi Garev. Tiuj elektoj estas nova rekono pri la vicleco de la bulgara pacmovado.

Antaŭ la komenco de la afereca laboro de la MEM-kunveno niaj samlandaninoj Galja Kostova, Jana Cikalova kaj Angelina Sotirova plenumis riĉan artprogramon, dediĉe al la pacdefendo, kiun la ĉeestantoj entuziasme aplaudis.

En sia parolado la prezidanto de MEM d-ro Imre Péthes (Hungario) detale parolis pri la

nuntempa monda politika situacio kaj klare montris, kiuj estas la kontraŭuloj de subskribo de monda paco-kontrakto, de malpermeso de nukleaj eksperimenteksplozoj. Li bonege priskribis la viglan aktivadon de esperantistoj el la tuta mondo por konservo de la paco kaj la rolon de Esperanto por interkompreniĝo kaj kunlaborado interŝtataj. La diskutadon partoprenis ankaŭ bulgaroj, kiuj koncize informis pri sia pacaktivado kaj alvokis la ĉeestantojn al pli regula kunlaborado al revuo „Paco“ kaj al bulteno „Pacaktivulo“.

La pacaranĝojn dum la kongreso kompletigis Ekspozicio pri la paco, kiun aranĝis per kolektoj de fotoj kaj artikoloj pluraj germanaj kaj japanaj esperantistoj. La dokumentaj fotoj pri la rezultoj de la atomeksplodo en Hiroŝimo kaj Nagazaki forte impresis la spektantojn.

Kvankam la anoncita kongresa temo estis „Antikvo kaj modernio...“, la ĉefa kongresa temo efektive estis la problemo pri konservo de la monda paco!...

En ĉiuj fakaj kunvenoj kaj forumoj de la UEA-komitato estis diskutitaj planoj por preparo de la jubileo de Esperanto en 1987. Dum la kunveno de la Kunordiga Jubilea Komitato, gvidata de la prezidanto de UEA s-ro Maertens, ankaŭ la bulgaroj raportis pri la jubilea programo de BEA, kiu estas vere im presa.

NE NUR KUNSIDOJ

sed ankaŭ ekskursoj kaj amuzoj estis proponitaj al la kongresanoj. Dum la ekskursotago oni forveturis ĉu grupe, ĉu private al diversaj regionoj kaj urboj de la kongreslando: al Munkeno, Nurenbergo, Würzburg, Regensburg, al la Bavaraj Alpoj, al la lago Konstanca k.a. kaj konatiĝis kun famaj per siaj historio, kulturo kaj naturreleco lokoj. La kongresa balo kaj la junulara amuzvespero donis apartan koloron al la kongresa programo.

Rapide pasis la kongresaj tagoj.

Multaj malnovaj geamikoj renkontiĝis kaj kune ĝuis rememorojn kaj novajn travivaĵojn; ekestis multaj novaj amikiĝoj. La internacia lingvo Esperanto denove estis interligilo de homoj el ĉiuj partoj de la terglobo, kiuj etendas manojn unu al la alia por amike kunekzisti kaj kunlabori por la bono de la tuta homaro.

Dum la solena fermo de la kongreso en Aŭsburgo la dommastroj laŭtradicie transdonis la kongresan flagon al la ĉinaj esperantistoj, kiuj estos dommastroj de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, 1986.

Do, ĝis novaj renkontiĝoj en Pekino!

Aŭsburgo—Sofio,
aŭgusto 1985

DONČO ĀITROV

Eminentuloj de UEA kun la ĉefurbestro
de Aŭsburgo s-ro Hans Breuer (dua de dekstre)

EN AMIKA ETOSO

(41-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso)



Ĝenerala vidaĵo de Eringerfeld

La 41-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) (22—29. 07. 1985, Schloss Eringerfeld, FRG) okazis en la Internacia Jaro de Junularo. Gastiganto estis Germana Esperanto-Junularo, kiu disponigis al la kongreso la modernajn konstruaĵojn de la Internulejo Schloss Eringerfeld. Eringerfeld troviĝas en la federacia lando Nordrejn-Vestfalio.

En Eringerfeld kongresis pli ol 400 junaj esperantistoj el 32 landoj. Alta protektanto de IJK estis la ministro-prezidanto de la lando Nordrejn-Vestfalio **Johannes Rau**. Kiel gastoj ĉeestis ankaŭ **Barbara Despiney**, estrarano de UEA pri junulara agado, la sekretario de Internacia Studenta Unuiĝo (ISU) k.a. La temo de la ĉi-jara IJK estis „Junularo inter revo, ribelo kaj rezignacio“. Ĉe la solena malfermo la prezidanto de TEJO Ian Jackson raportis pri la agado de la organizaĵo dum la forpasinta dujara periodo.

Dum la kongresaj tagoj junaj esperantistoj el diversaj landoj dividis opiniojn pri problemoj de la junularo en siaj landoj kaj en la Esperanto-movado. Bedaŭrinde la pliparto de kongresanoj ne partoprenis la diskutojn. La rezulto de la diskutado montris, ke la junaj esperantistoj nuntempe ne povas esti neŭtralaj rilate la problemon de paco kaj vetarmado. Denove ili esprimis sian deziron vivi en paco kaj interkompreniĝo, kaj dum la kongresa semajno ili pruvis, ke tio estas ebla. Kelkaj estraranoj de TEJO forveturis por partopreni la 12-an Festivalon de Junularo kaj Studentoj en Moskvo. Multaj esperantistoj partoprenis la festivalon kiel landaj delegitoj.

La komitatkunsidoj atingis fruktodonajn rezultojn. Estis pridiskutita la nova projekto pri regularo de TEJO. La komitatanoj elektis novan estraron por la sekvontaj 2 jaroj. Denove oni elektis kiel prezidanton de TEJO Ian Jackson (Britio); vicprezidantoj — Martin Haase (FRG) kaj Marie Vanĉurova (ĈSSR); ĝenerala sekretario Jan Koszmaluk (Pollando); kasisto — Alex Humet (Belgio) kaj estraranoj — Elisabeth Schwarzer (FRG), Norberto Saletti (Italio) kaj J. Parzysek (Pollando). Parzysek organizos la jubilean 43-an IJK en Krakovo (Pollando) en 1987.

Vespere LKK organizis riĉan distran programon. Dum la germana nacia vespero la kongresanoj ĝuis belajn germanajn popoldancojn, prezentitajn de junulara Esperanto-grupo el Bonn, aŭskultis tradukojn de la poezio de W. Busch k. a. La esperantistaj rok-grupoj „Amplifiki“ el Skandinavio kaj „La Mondanoj“ el Berlino (okc) prezentis kun granda sukceso modernan muzikon en Esperanto. Ĉiuj delegacioj prezentis popolarton el siaj landoj. La japana grupo montris tradician japanan teatron de ombroj per la spektaklo „La edziniĝo de la musino“. La bulgara grupo prezentigis sukcesplene per belegaj versaĵoj de Zamenhof, kiujn recitis Angelina Sotirova kaj per operetaj arioj de Galja Kostova-Toteva. Germana Esperanto-Junularo unuafoje prezentis la teatraĵon „La kalva kantistino“ de Eugene Ionesco, kio estis unua bona paŝo en la Junulara Esperanto-Teatro. En la libera tempo la gejunuloj havis eblecon naĝi, manlabori, kanti, sporti, lerni popoldancojn.

El Bulgario partoprenis la IJK 5 junaj esperantistoj, kiuj aktive kongresis kune kun siaj geamikoj el diversaj landoj. Kun granda intereso estis aŭskultita la prelego pri la socia aktivado de la bulgara junularo kaj ĝia partopreno en la ŝtata regado.

KELKAJ IMPRESOJ

I. Jackson:

— Mi ĝojas, ke ĉi tiu kongreso estas multnombra — ĉ. 400 personoj. Estas bone, ke venis gejunuloj ankaŭ el Usono, Irano, el aziaj landoj. Mi estas kontenta pri la programo, ĉar nia plej granda forumo traktas la ĉefajn temojn de la junularo, ĝuste en la Junulara Jaro. Oni povas aŭdi kaj diskuti ĉi tie, kiel junularaj organizaĵoj konkrete agas en dekoj da landoj. La kultura programo estis bona, sed la germanoj faras tion malgaje, serioze. Oni devas pligajigi la atmosferon.

B. Despiney:

— Ĉi tiu IJK estas multnombra. Min ne kontentigas la disigiteco de la ejoj, ne estas centra ejo.

Andy Künzli (redaktoro de „TEJO tutmonde“):

— La partopreno de la junularo estas relative multnombra en tiu IJK. La kongresa temo estas unu el la plej interesaj kompare kun la pasintaj kongresoj, sed mi ne estas certa kiomgrade ĝi trovis eĥon ĉe la partoprenantoj. La programo estas tre varia. La kongreso en Eringerfeld laŭ la publiko, programo kaj etoso estis tipe eŭropa kongreso. Mi estas scivolema, ĉu io ŝanĝigos en Israelo. Mi trovas la ejon taŭga, sed iomete izolita en la kamparo kaj la ejoj — for unu de la alia. Mi salutas la irananojn kaj usonanojn partoprenon.

Neal Mc Burnett (Usono):

— La kongreso estis bone vizitita. Ĉiu povis alparoli, aŭskulti prelegojn. En Usono oni ne komprenas, kiel grandskala estas la Esperanto-movado. Ĉiuj parolas saman lingvon, mi eĉ ne povas diferencigi la naciecon de la homoj.

— *Kiaj gravaj taskoj staras antaŭ la TEJO-estraro?*

I. Jackson:

— Evoluigo de programo por aktivula trejnado; fondo de fako pri la estraranoj aparte taskigitaj. Organizado de la 43-a jubilea IJK en Krakovo, Pollando en 1987. Evoluigo de la E-agado en la ekstereŭropaj landoj — Ĉinio, Japanio kaj de la fakaj sekcioj de TEJO.

— *Kien devas plibonigi la nova TEJO-estraro?*

B. Despiney:

— La TEJO-estraro devas celi interkomprenigon. La gejunuloj estas progresemaj, interesigas pri ĉio. La ĉeesto de UEA-estraranoj en la kunsidoj de TEJO reciproke plibonigas la komunan laboron.

— *Kiajn gravajn problemojn oni starigis dum la diskutoj?*

A. Künzli:

— Estis esploritaj problemoj de la hodiaŭa socio, ĉefe en Eŭropo kaj oni interalie povis trovi paralelojn kaj diferencojn de la socio en okcidenta kaj orienta Eŭropo. Krome oni skizis junularajn problemojn de pli fruaj tempoj kaj komparis ilin kun la nuntempaj.

— *Via opinio pri la partopreno de la bulgara Esperanto-Junularo en ĉi tiu IJK?*

I. Jackson:

— Mi havas pozitivajn spertojn pri la bulgaroj. Ili havas ĉiam saĝan kontribuon en la komitato. TEJO preparas junularan seminarion en Bulgario. Ni deziras kongresi iam denove en Bulgario.

A. Künzli:

— Mi deziras esprimi mian ĝojon, ke ĉi-jare denove partoprenis IJK grupo el Bulgario, des pli ke mi havas personan simpatian al la bulgaroj. Apartan aplaudon ricevis la bulgaraj aktorinoj, kiuj prezentis unu el la plej altkvalitaj eroj dum la Internacia Vespere.

Neal Mc Burnett:

— Mi ŝatas la bulgarajn popoldancojn. Mi dezirus lerni de la bulgaroj ĉi tie novajn dancojn. Mi forte dezirus viziti Bulgarian, konatiĝi kun la kutimoj, kun la opinio de la bulgaroj pri diversaj demandoj (kiel ekz. kio estas por ili libereco; kion ili opinias pri Usono kaj Sovetunio, ktp.)

Dum la kongresaj tagoj oni interparolis ankaŭ pri multaj aliaj aferoj. Ĉie regis amika junulara etoso. La gejunuloj adiaŭis, kiel kutime, per komunaj Esperantaj kantoj, promesante renkontiĝi en la sekvonta IJK, aktivadi por kunlaborado kaj reciproka interkompreniĝo, por paco.

CVETKA MITEVA,

prezidantino de la Junulara Sekcio ĉe BEA

Abonu! Faru abonon ankaŭ por viaj amikoj alilande!

„BULGARA ESPERANTISTO“

MONATA ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

- Unu el la plej malnovaj E-revuoj en la mondo — fondita en 1919
- Granda formato, riĉe ilustrita
- Aktualaj problemoj de la E-movado en Bulgario kaj en aliaj landoj
- Libera tribuno de la legantoj
- Specialaj rubrikoj: „Enlanda movado“, „Tra la E-mondo“, „Verdaj steletoj“, „Heroa pasinteco“, „Deziras korespondi“, „Tra la gazetaro“ ka.
- Literaturo, poezio, recenzoj
- Jarabono por 1986: por Bulgario — 2,90 lv
por socialismaj landoj — 5,42 lv.
por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv.

Ne prokrastu fari vian abonon por 1986! Lasta limtempo — 10-a de decembro 1985.

Abonu tuj pere de REP. La eldonkvanto estas limigita.

Esperantaj societoj, Esperantaj aktivuloj — ni nepre plenumu la decidon de la 41-a kongreso de BEA: ĉiu esperantisto — abonanto de „BULGARA ESPERANTISTO“

ESPERANTISTAJ VOĈOJ EN MOSKVO

La XII Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Moskvo jam pasis, sed la neforgeblaj impresoj daŭre vivas en nia konscio: ĉiam ankoraŭ ni sentas la etoson de amikeco dum la festivala semajno.

Partoprenis 18 000 delegitoj el 151 landoj de la mondo, sed kune kun ĵurnalistoj kaj turistoj ĉiuj gastoj en la ĉefurbo de Sovet-Unio estis preskaŭ 40 000. Partoprenis 29 diversaj politikaj, religiaj, publikaj kaj neŭtralaj junularaj organizaĵoj el la tuta mondo.

Malbona, nebula vetero renkontis nin en Moskvo. Sed kia estis nia surprizo, kiam du homoj antaŭ la malfermo de la festivalo la nuboj subite malaperis kaj la suno ekridis el la blua ĉielo. La sekvontan tagon en la gazetoj oni povis legi, ke la organizantoj „ŝanĝis“ la veteron, uzante aviadilojn, kiuj disĵetis glaci-an polvon en la nubojn kaj igis ilin plui antaŭ ol ili atingis Moskvon. Tiel ni ĝuis belan veteron!...

La festivala programo estis tre riĉa. Ĉiutage okazis preskaŭ 200 diversaj aranĝoj. Ili estis organizitaj en kino- kaj teatro-salonoj, en aŭditorioj de la Moskva Universitato, en parkoj kaj sur placoj. Nur en parko „Gorkij“ funkciis 16 centroj kaj pavilionoj de la sovetaj respublikoj, kie estis organizitaj ekspozicioj kaj oni prezentis folklorajn programojn. Funkciis ankaŭ naciaj centroj de ĉiuj landoj-partoprenantoj en la festivalo, kie oni organizis renkontiĝojn, folklorajn kaj kulturajn programojn. La bulgara festivala centro estis en la kulturdomo de la elektra uzino „Lenin“. Ĝi estis sufiĉe granda — preskaŭ 800 personoj povis samtempe partopreni niajn aranĝojn. Nia delegacio por la festivalo estis 400 persona, sed inkluzive turistojn, ĵurnalistojn kaj aliajn grupojn nombris preskaŭ 1500 homojn.

Estas tre malfacile skribi pri la amplekso de la festivalo. La grandega teritorio de la urbo kaj la varieco de la programo, igis la festivalanojn bedaŭri, ke ili ne povas esti samtempe ĉie, partopreni en ĉiuj aranĝoj, vidi ĉion. Sed mi provos doni nur modestan skizon pri la enhavo de la programo.

La festivalaj tagoj komenciĝis je la 8 h matene kaj daŭris ĝis la 24 h vespere. Samtempe funkciis dekkvin temaj centroj, kiuj organizis po kelkajn diskutojn. Estis centro pri paco kaj malarmado, kontraŭfaŝisma centro, centro pri kontraŭimperiisma solidareco, centro pri ekonomia kunlaboro kaj nova ekonomia ordo, centro pri la virinaj rajtoj, pri defendo de la naturo, pri turismo, sporta centro, studenta, scienc-teknika centro k.t.p.

Ĉiutage oni organizis politikajn mitingojn. La kultura programo konsistis el koncertoj kaj festoj de la diversaj artoj kie ankaŭ funkciis laborgrupoj; estis organizitaj ekspozicioj pri pentroarto, etnografio, turismo. Plej interesaj por la festivalanoj estis la rok-operoj kaj folkloraj programoj.

La sporta programo ankaŭ estis tre riĉa — „kurado de la paco“, en kiu la plej juna partoprenantino estis 4-jara knabineto el Moskvo; futbalaj kaj korbopilkaĵoj matĉoj, ŝakturniro kun partopreno de famaj ŝakmajstroj sur 1000 tabloj k.a.



Gaja festivala etoso en Moskvo

Malgraŭ tiu abundeco de programeroj, la organizado estis perfekta. Je dispono de la festivalanoj estis pli ol mil aŭtobusoj. La organizantoj eĉ antaŭvidis la eventualajn malfruigantojn — por ili ĉiam estis speciala buso (ja ĉie estas malfruigantoj!).

Eble malmulte da homoj scias, ke en la festivalo partoprenis ankaŭ esperantistoj el diversaj landoj, kiuj kontribuis por riĉigo de la programo. Estis geesperantistoj el Sovetunio, Pollando, Bulgario, GDR, Svedio, Svislando, FRG, Okcidenta Berlino, Kubo, Hungario kaj Britio. Plej granda estis la grupo de la hungaroj — pli ol 20 esperantistoj.

Dank' al la natura komunikigemo de la esperantistoj, ni rapide trovis nin en la maro de festivalanoj kaj dum la festivalaj tagoj multfoje estis kune. La moskvaj esperantistoj organizis renkontiĝon kun la delegitoj-esperantistoj. Post la laborkunveno la armenaj esperantistoj prezentis artan programon. Speciale por la festivalo en Moskvo venis esperantistaj grupoj el kelkaj respublikoj de Sovetunio.

Sentante la bezonon de pli da kontaktoj kaj dank' al niaj samideanoj el FRG ni havis renkontiĝon ankaŭ en la germana festivala klubo. Partoprenis ĉirkaŭ 70 esperantistoj. La atmosfero estis tre agrabla kaj la aliaj festivalanoj povis vidi kiel realiĝas kontaktoj pere de la Internacia Lingvo kaj eksenti iom de la esperantista etoso de amikeco kaj internacieco. Nia amiko el Svedio, la profesia kantisto Roland von Malmberg prezentis propran artan programon.

Ĉiutage la armenaj esperantistoj organizis antaŭtagmeze renkontiĝojn en sia pavilono kaj ni povis regule kontakti kun ili.

La ĉefa festivala arango, kiun partoprenis la esperantistoj, estis la diskuto en la Moskva Universitato pri temo: „Informagado kaj lingva komunikado en la mondo“.

Dum la diskuto estis organizita simultana tradukado, ankaŭ en Esperanton. Ni esperantistoj parolis inter si nur esperante kaj la aliaj

partoprenantoj en la diskuto konvinkigis, ke la Internacia Lingvo vere estas taŭga kaj efika komunikilo. Tio vekis grandan intereson pri ĝi. La paralela traduko el Esperanto en rusan kaj poste en la aliajn oficialajn festivalajn lingvojn — anglan, germanan, francan, hispanan kaj araban, malrapidigis kaj malhelpis la komprenon.

La diskutado en la Studenta Centro, kiu okazis en la Moskva Universitato montris, ke la mondo bezonas internacian lingvon kaj ke Esperanto estas taŭga solvo de tiu problemo.

La fermo de la festivalo estis apoteozo de ĝojo kaj beleco. Ĝi estis natura fino de tiu festo de la juneco kaj amikeco, kies gastiganto estis suna Moskvo kaj la laborema kaj pacama sovetia popolo.

METODI ANGELOV,
membro de BEJ-estraro

KUN JUNULARA LABORIMPETO

Agrabla trumpet-signalo vekis min.

Estis 5,30 h matene.

En la apudaj ĉambroj aŭdiĝis bruo, mallaŭtaj streĉitaj voĉoj, paŝoj de kurantoj...

En la mateniĝo verdstela flago flirtadis super la lignaj dometoj de la Internacia Junulara Esperanto-Laborbrigado en urbo Guljanci (distrikto de Pleven).

Sur la placeto jam amasiĝis la brigadanoj, pretaj por la nova labortago. En la agroj, plantitaj per tomatoj, paprikoj, tabako, kanabo, ankaŭ hodiaŭ ili entuziasme, kun junulara impeto laboros por plenumi la tagajn labornormojn...



La polaj brigadanoj Jolanta Szymanska, Marlena Krajewska kaj Witold Waluk estis inter la plej laboremaj.
Foto: Georgi Liĉev

Jam trian fojon junaj esperantistoj el diversaj landoj partoprenas la Internacian Junularan Esperanto-Laborbrigadon, organizitan de la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Distrikta Brigadana Stabo ĉe la Komsomolo en Pleven. Ĉi-somere, de la 3-a ĝis la 23-a de aŭgusto, la brigadana urbeto en Guljanci akceptis pli ol 130 junajn geesperantistojn — 11 en GDR, 3 el Rumanio, 20 el Jugoslavio, 40 el Pollando, 3 el Ĉeĥoslovakio, 35 el Bulgario kaj por dua fojo — denove la samajn 4 hispanojn, kiujn forte ĉarmis nia lando.

— La Internacia Junulara Esperanto-Laborbrigado en Pleven jam estas tre populara kaj ĉiam pli granda estas de nombro de dezirantoj ĝin partopreni — diris al mi la komandanto de la brigadana stabo Ceko Filipov. — La brigadanoj estis organizitaj en kvar labor-taĉmentojn. Ni sukcesis certigi al ili favorajn vivkaj laborkondiĉojn, kio efektivigis bonajn laborrezultojn: ili ĉiuj plenumadis la tagan normon — 190 kilogramoj da tomatoj popersonone kaj fine de la brigado ĉiu ricevis ĉirkaŭ 50 levojn por sia laboro.

Tutkompreneble, por ni pli gravaj estis la agrabla, vere internacia amika etoso kaj la perfektigo de Esperanto, ĉiutage praktikata. Tiucele ni organizis du kursojn: por komencantoj, gvidata de Marko kaj Miĥela Konstantin el Rumanio, kaj por progresintoj — kun instruanto la hispano Santiago Martin Relea, kiu bone scipovas bulgaran lingvon. En Hispanio Santiago estas senlabora. Li deziras resti en Bulgario kaj perlabori sian panon per instruado de hispana lingvo al bulgaroj. Multaj

el la brigadanoj krom Esperanto lernis ankaŭ bulgaran lingvon.

La studentino pri medicino Darinka Dimitrova, membro de la brigadana stabo, kiu zorgis pri la kultura kaj amuza programoj de la brigado, aldonis:

— Laŭ komuna opinio, la programo estis varia kaj riĉenhava: vesperaj programeroj de apartaj naciecoj, vespero de bulgaraj folkloraj dancoj, renkontigoj kun laborkolektivoj en urbo Somovit, ekskursoj al urboj Pleven (vizito al la fama historia panoramo), Brest (diskoteko kun dancado), antikva Gigen (kie estas konservigitaj ruinoj el la romia periodo) ĉe rivero Danubo, k. a. Multaj brigadanoj organizis ankaŭ proprajn amuzprogramojn (vizito al kinejo, ekskursoj en la regiono, k. a.). La devizo de la brigado — „Labori, amikiĝi, amuziĝi“ — plene realiĝis.

La laborrezultoj de la brigadanoj estas kontentigaj kaj kuraĝigaj. Tiu iniciato de DE de

BEA en Pleven estiĝis jam tradicia kaj ĝi estas imitinda. Eble ĝin sekvos ankaŭ la esperantistoj el Botevgrad, kiuj intencas organizi Internacian Esperanto-Laborbrigadon por restarigo kaj konservo de la domo-muzeo de la fama esperantisto-publicisto Trifon Hristovski.

La solenaĵon lige kun la fino de la laborbrigado (okazinta la 23-an de aŭgusto j. k. en vilaĝo Sijakovo) partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la Junulara Sekcio ĉe BEA kaj ties prezidantino Cvetka Miteva. Ili transdonis al la brigadanoj la salutojn kaj la dankojn de la Centra Estraro de BEA, kiu alte taksas tiun ĉi internacian Esperanto-aranĝon en nia lando. Ili esprimis la esperon, ke ĝi multe kontribuos al la internacia junulara interkompreniĝo kaj paca kunlaborado pere de Esperanto kaj estiĝos bona kaj rezultodona tradicio.

D. SIMEONOV

ANTAŬ SVIEKO'86

Lige kun la preparo de la Internacia Ekologia Konferenco SVIEKO'86 (okazonta en Svištov 1986) la Ekologia Sekcio ĉe BEA aktive partoprenis en jenaj du sciencaj aranĝoj.

La 23-an—25-an de aprilo 1985 en Jambol okazis Unua Nacia Konferenco pri Ekologio de la Kamparmastrumo (kunorganizantoj — la Distrikta Agrarindustria Asocio en Jambol, la Bulgara Ekologia Societo, la Supera Financa-Ekonomika Instituto „D. A. Cenov“ — Svištov kaj la Ekologia Sekcio ĉe BEA).

La bazaj prelegoj estis prezentitaj de prof. Ĥr. Marinov („Ekologizo de la kamparmastrumo“) kaj de la akademiianoj A. A. Juĉenko, A. D. Ursul el la Moldava SSR („Adaptiva multifaktora strategio de intenseco de la agrikultura produktado“). Inter la prelegoj prezentitaj de esperantistoj kaj presitaj en la eldonita kolekto, oni devas noti: „Agroĥemiaj kaj energiaj problemoj de ekologizo de la agrokulturo“ (Ĥr. Marinov), „Ekologiaj problemoj, ligitaj kun utiligo de la tero“ (G. Gergov), „Problemoj de industria bestbredado kaj mikroklimato el ekologia vidpunkto“ (St. Kukuŝev), „Utiligo kaj protektado de la tero kaj grundrezervoj en la distrikto de Jambol“ (P. Papazova), „Valora kaj praksiologa aspektoj de la antagonismo „socio-naturo“ (C. Kardaŝev), „Problemoj ĉe regado de la kvalito de naturaj akvoj“ (A. Kocarjan, A. Maljutin), „Aplikado de elektrokemiaj metodoj ĉe purigo de la uzata akvo“ (O. Avaste k. a.), „Regiona banko de biologiaj specaj informoj“ (A. Rzykmowski), „Teknologio kaj medio“ (Z. Adoni), „La Agrikulturaj medioprotektaj esploradoj“ (B. Keresztesi).


Dum la organiza kunveno, oni elektis estraron de la Ekologia Sekcio ĉe BEA en jen konsisto: prof. Ĥr. Marinov — prezidanto, ing. M. Nenkov — sekretario, doc. Cv. Kardaŝev, ing. El. Todorov — membroj.

La 31-an de majo 1985 en Karlovo okazis Internacia Seminario „Esperanto kaj la Sciencoteknika Progreso“. Gravan lokon en nia laboro havis ankaŭ problemoj de la ekologio, informado kaj interlingvistiko. La lastaj estis tuŝitaj ankaŭ en la salutparolo de la vicprezidanto de BEA ing. Petăr Todorov kaj en la baza prelego de ing. B. Leonov, en la prelegoj de Maria Bartkovska (Ĉeĥoslovakio) kaj de la kandidato de teknikaj sciencoj K. Velkov. En la presitaj materialoj de la seminario, oni povas inkluzivi ankaŭ la prelegon de prof. Ĥr. Marinov pri Ekologio de la Roza Valo (prof. Marinov dum la seminario estis en USSR). Kun substrekite ekologia enhavo estis la prelegoj de ing. Mariana Stavreva („Ekologiaj problemoj de la ŝtalfandista uzino apud urbo Rakovski, de d-ro Anna Székely (Hungario) „Pligrandiĝo de la nitrata enhavo de la akvo-rezervoj kaj akvopurigado“, de Fr. Molnar, (Hungario) „Apliko de modernaj rubajsendanĝerigaj metodoj kaj medioprotektado“, de doc. C. Kardaŝev („Karakterizoj de la ekologia kulturo“).

Oni devas noti la bonan laboron de la organizantoj — P. Papazova el Jambol kaj ing. B. Leonov el Karlovo. Niaj eksterlandaj samideanoj esprimis sian admiron pri la kolekto „EKOFUTURO“. La Ekologia Sekcio ĉe BEA gajnis aŭtoritaton per sia aktiveco.

DOC. C. KARDAŜEV,
SABINA APOSTOLOVA

RENKONTE AL HISTORIA JUBILEO



Veliko Târnovo—vido al „Carevec“ kun la Patriarkejo.
Foto: Zdravko Nikolov

La nacia jubilea festo lige kun la 800-jara datreveno de restarigo de la bulgara ŝtato okazos la 20-an de oktobro j.k. Tiu tre grava por la bulgara popolo evento estas daŭrigo de la 1300-jara jubileo de nia lando. Ĉi-sube aŭtoritatuloj el Veliko Târnovo parolas pri tiu jubileo speciale por la legantaro de „Bulgara Esperantisto“.

Margarita Kemalova, sekretario de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio:

—En 1985 la bulgara popolo celebras la 800-jaran datrevenon de la venka ribelo de la fratoj-bojaroj Asen kaj Petâr kontraŭ la bizanca sklaveco. Tuj post la ribelo Târnovo estis proklamita ĉefurbo de la restarigita bulgara ŝtato. Kiel konate dum XII—XIV jc. la urbo estiĝis unu el la plej gravaj kulturaj centroj en Sud-Orienta Eŭropo. Pro tio Veliko Târnovo, nomita de Todor Jivkov „Nia nacia fiero, nia nacia kapitalo“, per speciala decido estis elektita dommastro de tiu nacia festo. La distrikta komitato de BKP akceptis programon por la periodo 1982—1985. Tiu programo baziĝas sur la ideo pri unueco inter nuntempo, pasinteco kaj estonto. Ĝi celas popularigon de la plej helaj momentoj el la historio

de Bulgario, de la plej progresemaj fortoj de la socio, de la humanaj idealoj de nia popolo. Tiel reliefigas la ligo inter historia kontribuo, problemoj de la evoluinta socialisma socio kaj impeto de la laboramasoj al la komunisma idealo. Plurajn akcentojn enhavas la programo: 1) finiĝo de arkeologiaj esploroj de mezepokaj monumentoj kaj ties ekspono; 2) scienca, propaganda kaj eldona agado. Ni ĝojas, ke ankaŭ la esperantistaro estos informita pri tiu nia agado, pro kio ni dankas al la redakcio de revuo „Bulgara Esperantisto“.

Dimitâr Zdravkov, urbestro de Veliko Târnovo:

— Nia loĝantaro havas la devizon: „Veliko Târnovo estas nia urbo kaj ni estas ĝiaj mastroj“. Okaze de la jubileo ĉiu târnovano donas po 30 labortagojn por la plibeligo de la urbo. La malnovaj urbaj kvartaloj estas restaŭrataj en la stilo de la malnova bulgara arkitekturo.

Ni konstruis novajn lernejojn, infangardenojn, magazenojn. Meze de la urbo, sur Marino pole (Marino-kampo) estas la nova Akva Kaskado. Estas konstruita nova sporta halo por 3000 personoj, subĉiela glacia ludejo per monoferoj far la loĝantaro mem. La lokaj esperantistoj baldaŭ havos propran domon en la malnova kvartalo Asenova Mahala. Ĝi faciligos la E-turismon (per disponado de 50 litoj) kaj la E-arangojn. Ĉio ĉi estas socialaj akiraĵoj de nia urbanaro.

Maria Maneva, merita agantino de la kulturo, prezidantino de la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo:

Laŭ la programo ni devis finkonstrui kaj restaŭri sep historiajn kaj kulturajn monumentojn kiel:

—Monumento de fratoj Asen kaj Petâr, kiel dankesprimo de nia popolo;

—Plena restaŭro de la preĝejo „Sankta Dimitâr“, en kiu estis proklamita la ribelo en 1185;

—Restaŭro de la Patriarkejo sur la fortikaĵo Carevec, kies murpentraĵoj montras la spiritajn atingojn de mezepoka Bulgario

—Finkonstruo de Arta Galerio, kie estos ekspoziciataj pentraĵoj pri Veliko Târnovo kiel ĉefurbo dum XII—XIV jc.;

—Muzeo de la Fonda Kunveno en la historia konstruaĵo „Konaka“ (Urbodomo).

Kulturaj arangoj en la urbo dum 1985 estas la nacia teatra revuo „Rigardo al la jarcentoj“. Festo de muzika kaj filma arto, kelkaj naciaj ekspozicioj pri arkitekturo, histori-revolucia pentroarto, artmetioj k.a.

Intervjuis: **OLGA CANKOVA**

EĤOJ PRI NIA KONGRESO

Pri la 41-a Kongreso de BEA la bulgara socio unue eksciis dank' al la anticipa informado fare de la bulgaraj amaskomunikiloj en la antaŭvespero de la alta esperantista forumo.

Dekses reprezentantoj de Bulgara Telegrafa Agentejo (BTA), de la Televido kaj la Radio kaj de la ĉefurba gazetaro partoprenis gazetan konferencon lige kun la kongreso. Ĝi okazis la 3-an de julio j. k. en unu el la salonoj de la Unuiĝo de Bulgaraj Journalistoj (UBJ). Ĉeestis ankaŭ membroj de CE de BEA kaj la sekretario de UBJ Bogomil Meĉkarski. En la centra gazetaro aperis materialoj, dediĉitaj al la historio de la bulgara E-movado, al la agado de BEA kaj al la rolo, kiun ludas la Internacia Lingvo en nuntempa mondo, al ties kontribuo por konservo de la paco.

En la vendreda eldono de J. „Oteĉestven Front“ (Patrolanda Fronto) de la 5-a de julio j. k. oni publikigis intervjuon kun Ĥristo Gorov, prezidanto de BEA, heroo de la socialisma laboro. Per siaj respondoj li konigis al la legantoj la aktivan internacian pacagadon de la bulgaraj esperantistoj dum la periodo inter la lastaj du kongresoj.

En sia artikolo, publikigita en j. „Narodna Mladej“ (Popola Junularo), la ĝenerala sekretario de CE de BEA Dimităr Papazov skribas pri la rolo de la E-junularo por disvastigo de la bulgara E-movado, pri la junularaj E-kongresoj, okazintaj en nia lando, kaj pri la instigado de Esperanto en Bulgario.

J. „Veĉerni Novini“ (Vesperaj Novaĵoj) en sia numero de la 6-a de julio j. k. donas lokon al intervjuo kun Ĥristo Gorov

La 7-an de julio j. k. informon pri la kongreso aperigis j. „Kooperativno Selo“ (Kooprativa Kamparo), kiu interalie proponas ankaŭ mallongan historian skizon pri la disvolviĝo de la Internacia Lingvo en nia lando.

Tuj post la gazetara konferenco la **Bulgara Radio** elsendis informon pri ĝi kaj la 6-an de julio — dum la tuta kongresa tago en ĉiuj siaj emisioj programo „Horizonto“ informis la radioaŭskultantojn pri la kongresa laboro.

Ankaŭ la ĵurnalistoj el la Televido turnis specialan atenton al la forumo de la bulgaraj esperantistoj. Dum la tuta kongresa tago en la kongresejo laboris du skipoj el **Bulgara Televido**.

La kongreson respegulis ankaŭ reprezentantoj de diversaj aliaj amaskomunikiloj. En gazeto „Sofijski Novini“ (Sofiaj Novaĵoj), aperanta en kelkaj fremdaj lingvoj kaj destinita por eksterlando, eldonaĵo de Agentejo „Sofia Press“, la 24-an de julio j. k. oni publikigis artikolon pri la historio de BEA.

MARIA JANKOVA

UNUA BULGARA TURISTA E-KONFERENCO

La 1-an de junio 1985 en urbo Karlovo, situanta en la Valo de Rozoj, okazis la Unua Bulgara Konferenco de Turistoj-Esperantistoj.

Dimităr Mutuŝev — prezidanto de la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, prelegis pri temo „Stato kaj estonteco de la Esperanto-turismo en Bulgario“. Li informis, ke dum la lastaj kvar jaroj la Turista Sekcio estas unu el la plej agemaj inter la trideko da fakaj asociaj sekcioj. Dank' al la kunlaboro kun neesperantistaj instancoj, en Esperanto estas eldonitaj folioj, broŝuro kaj filmo pri turismo.

La 87 delegitoj, venintaj el diversaj partoj de Bulgario, vigle priparolis la sekcian agadon — la atingitajn rezultojn kaj la planojn por plua disvolvo de la Esperanto-turismo.

La akceptita rezolucio por disvolvo per Esperanto de la Turismo en Bulgario, tre konkrete prezentas la farendan agadon. Ĉi-sube mi mencias nur kelkajn punktojn el ĝi:

— La sekcio plivastigu siajn kontaktojn kun neesperantistaj turismaj instancoj en la lando. Oni agu por plenumo de la subskribita interkonsento por kunlaboro inter BEA kaj la Bulgara Turista Asocio;

— La Sekcia Estraro devas konkrete helpi, por ke la turistaj Esperanto-aranĝoj estu konsiderinde plibonigitaj. Dum la aranĝoj oni parolu nur en Esperanto;

— La sekcio zorgu ne nur por altiro de partoprenantoj en aranĝoj, okazantaj en Bulgario, sed ankaŭ sendadu grupojn al turismaj aranĝoj en eksterlando.

— La komencita aperigo de turismaj E-materialoj: flugfolioj, faldfolioj, prospektoj, broŝuroj, poŝtkartoj, emblemoj, insignoj, flagetoj, bultenoj k.a. devas esti konstanta zorgo de la sekcia estraro;

— La sekcio vigle partoprenu la kampanjon „Esperanto en la Internacia Danuba remado“, regatto, kiun lanĉis kaj gvidas la Internacia Asocio „Monda Turismo“;

La novelektita estraro promesis aktive laboru, por ke Esperanto vere fariĝu lingvo de la internacia turismo.

La konferencon salutis gastoj el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando. Kun granda intereso ili sekvis la laboron de la konferenco, kies sola laborlingvo estis Esperanto.

Tiaspecaj konferencoj okazos unufoje en du jaroj. Ilin organizos distriktaj aŭ societaj estraroj, kiuj plej sukcese laboras por enkonduko kaj aplikado de Esperanto en la sfero de turismo.

NIKOLA NIKOLOV

FILO DE BULGARIO KAJ MONDCIVITANO



Poeto, dramisto, publicisto, sociaganto, ŝtatisto — jen estas la granda staturo de Georgi Gagarov. Lia personeco estas alojo el la Botev-ideoj, el la „fajraj kolharoj“ de Smirnenski, el la blendita Vapcarov-kredo, el la konstruromantiko kaj la patoso de Penjo Penev...

Georgi Gagarov naskiĝis antaŭ 60 jaroj en la familio de minlaboristo. Dekkvinjara junulo li eniras la batalvicojn de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS), estas respondeculo de tiu organizaĵo en la Slivena knaba gimnazio. Pro sia kontraŭfaŝisma agado li estas kondamnita al 15-jara malliberigo. Post la venka Naŭaseptembra ribelo en 1944 li estas denove libera. Sub sian standardon lin akceptas la partio de la bulgaraj komunistoj. Li komencas studi en la Leningrada Supera Inĝeniera Instituto, sed baldaŭ translokiĝas en Moskvon, kie finas kun perfekta sukceso la Literaturan Instituton „Maksim Gorkij“.

Reveninte en la patrolandon, li laboras kiel redaktoro en gazeto „Literaturen Front“ (Literatura Fronto), dramaturgo de la Nacia Teat-ro de Junularo „Ljudmila Jivkova“, prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj. Li estas regule elektata en la konsisto de CK de la Bulgara Komunisto Partio, estas deputito en kvar mandatoj de la Parlamento, kie li estas prezidanto de la Konstanta Komisiono pri Spiritaj Valoraĵoj, de 1971 estas vicprezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario kaj prezidanto de la Konsilantaro por Evolui-

go de la Spiritaj Valoraĵoj de la Socio.

Deksesjara junulo, Gagarov publikigas sian unuan versaĵon en la mezlerneja revuo „Balgarska reĉ“ (Bulgara Parolo). En 1954 aperas lia unua verskolekto „Miaj Kantoj“, pritaksita kiel fenomeno en nia nova socialisma literaturo. Tiam la aŭtoro estas 29-jara. En la bonefika klimato, kreita de la Aprila Plenkunsido de CK de BKP en 1956, naskiĝas liaj novaj verskolektoj „En minutoj de silento“, „Birdoj kontraŭ la vento“, „Fojfoje“ „Konfeso“. La aktiva ĉeesto en lia verkaro de la patrolando kiel nedisigebla parto de la poezia mondo de Gagarov parolas pri granda, flama patrioto.

Georgi Gagarov manifestiĝas ankaŭ kiel originala dramisto. Li estas aŭtoro de la rimarkinda teatraĵo „La prokuroro“, post kiu sekvas „La pordoj fermiĝas“, „Ankaŭ morgaŭ estas tago“, „Tiu malgranda tero“ kaj aliaj, kiuj destinas al li indan lokon inter la grandaj nomoj en la nuntempa bulgara dramaturgio.

En la krea laboratorio de Georgi Gagarov aparte brilas lia publicistiko. Emociplenaj estas liaj publicistaj verkoj „Poezio, sed kiel la Botev-poezio“, „De Botev ĝis Botev“, „Antaŭ ol juri“. Sur tiu kampo la aŭtoro estas parenca al Botev kaj Vazov, al Javorov kaj Smirnenski, al Vapcarov, Cvetan Spasov kaj Nivjanin...

La verkoj de G. Gagarov estas tradukitaj en pli ol 30 lingvojn — rusa, ukraina, belarusa, ĉeĥa, slovaka, pola, greka, turka, angla, franca, germana, araba, hinda k.a. Multaj el liaj versaĵoj trovis lokon en pli ol 40 antologioj, dediĉitaj al la bulgara poezio. Liajn teatraĵojn oni prezentis en USSR, Usono, Danlando, Rumanio, Anglio kaj multaj aliaj landoj.

Pro lia granda kontribuo al la evoluo de la bulgara literaturo, pro lia aktiva soci-politika kaj ŝtatista agado Georgi Gagarov estas distingita per la plej altaj bulgaraj titoloj kaj premioj — laŭreato de Dimitrov-premio, popola aganto de la kulturo, portanto de la granda premio „Sofia“, de la literaturaj premioj „Dobri Cintulov“, „Ivan Vazov“, „Nikola Vapcarov“ k.a. En 1982 li estas elektita kiel akademiano. En julio de la kuranta jaro li estas distingita per la honora titolo „Heroo de socialisma laboro“.

Alta honoro por nia tuta kultura publiko estas la distingo de Georgi Gagarov per la speciala premio por poezio de la Franca Akademio. Li mem pritaksas ĝin kiel distingon, kiu „eĝe superas la meritojn de la aparta poe-

to, kaj estas rekono por la nuntempa bulgara poezio ĝenerale.“

La nomo de Georgi Gagarov — lirikisto, dramisto kaj publicisto, humanisto, patrioto kaj internaciisto merite havas lokon inter la nomoj de la grandaj mondkreantoj!

NANO KJUČUKOV,
merita aganto de la kulturo,
vicprezdanto de BEA

GEORGI ĜAGAROV

BULGARIO

Vi lando, eta kiel homa man' . . .
Sed mi ja ne bezonas vin pli granda,
en vi feliĉe estas suda sang' fluanta
kaj el siliko estas la Balkan' . . .

Kio, se hurlis lupoj kaj ŝakaloj
en viaj kampoj kaj en viaj valoj?
Al la amikoj vi kondukis bone,
la maliculajn tamen traktis senpardone.

Vi lando, eta kiel homa man' . . .
Rompigis tamen de ĉi tiu mano
la glas' venena de la bizancano
kaj l'otomana sanga jatagan'.

Vendistoj de tabak', de homa sango
negocis eĉ per via grundo,
sed ili falis kun rompita lumbo,
ĉar estas eta vi, sed peza ankaŭ.

Okazis mirindaĵo: renaskiĝis,
ridetis viaj domoj ruĝtegmentaj,
fiere flirtis la standardoj venkaj
kaj ĝoja rekta vojo antaŭ vi sterniĝis.

Vi floras nun! La nigra humo ŝvelas
sub la bulgara mano karesplena,
odoras geranion via ter' serena
kaj novan kanton via vent' fabelas.

Vi eta kiel man' patrujo mia. . .
Por mi vi estas tamen tuta mondo,
ĉar mi ja ne mezuras vin per longo,
sed nur per am', de kiu estas mi ebria!

PARTIA KANTO

Radias paca lumo,
helegas la lazur,
Patrujo estas unu,
la vojo — unu nur.

Alvokas nin l'epoko —
al agoj vokas nin,
ĉe ĝia forta voko
batalas ni sen tim'

Kunuloj, sub standardoj
ariĝu do kun kant',
kuniĝu, koroj ardaj
por nia patroland'.

Centraloj ĉie lumas —
ni faris ilin mem!
Fabrikoj novaj fumas,
maturas ora gren'.

L'afflikton ni detruas
konstante kaj kun vol',
senlace ni konstruas
feliĉon de l'popol'.

Tradukis: ASEN GRIGOROV

PRINTEPAJ FESTOJ DE ORIGINALA KAJ TRADUKA PROZO

Honore al la XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio kaj al 100-jariĝo de la Internacia Lingvo Esperanto, la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Jambol anoncas

LITERATURAN KONKURSON

de ORIGINALA kaj TRADUKA Esperanta prozo „Stranĝa-Sakar“ — Respubliko de la jurneco — '86“.

Jurio, konsistanta el reprezentantoj de CE de BEA kaj DE de BEA, premios la verkojn, kiel sekvas:

I. Originala rakonto:

I premio — 150 lv
II premio — 120 lv
III premio — 100 lv

II. Traduka rakonto (por aŭtoroj):

I premio — 120 lv
II premio — 100 lv
III premio — 80 lv

III. Traduka rakonto (por tradukistoj):

I premio — 60 lv
II premio — 50 lv
III premio — 40 lv

IV. Miniatur:

I premio — 80 lv
II premio — 60 lv
III premio — 50 lv

V. Fabelo:

I premio — 80 lv
II premio — 60 lv
III premio — 50 lv

VI. Anekdoto:

I premio — 50 lv
II premio — 40 lv
III premio — 30 lv

La literatura konkurso estas malkaŝa (publika). En ĝi povas partopreni aŭtoroj kaj tradukistoj el tuta Bulgario. La verkojn, tajpi-tajn en 3 ekzempleroj, oni devas sendi ĝis la 1-a de februaro 1986 laŭ adreso: DE de BEA, Jambol 8600, poŝtkesto 25.

GRAVA ANONCO

Oni avertis nin oficiale, ke pro reorganizado de la preseja bazo n-roj 7, 8, 9, 10, 11 kaj 12/1985 de revuo „Bulgara Esperantisto“ aperos kun malfruigo.

Ni anticipe pardonpetas la legantojn kaj esperimas esperon, ke ili komprenos niajn malfacilaĵojn.

LA REDAKCIO

Ĉefverko de la malnova rusa literaturo

„Kanto pri l'militiro de Igor“ estas glora ĉefverko de la antikva rusa literaturo de la fino de 12 jc., atesto pri la alta kultura nivelo de Kieva Rusio. Ĉi-jare plenigas 800 jaroj depost la kreo de tiu rimarkinda literatura monumento, kiu egale apartenas al la rusa, ukraina kaj belorusa literaturoj. Ĝi estas ilia komenco, metita ĉe la transiro de buŝaj al skribaj eposaj verkoj.

En la monda literaturo „Kanto pri l'militiro de Igor“ havas lokon vice kun tiaj rimarkindaj verkoj de la popola eposo kiel „Kanto pri Rolando“, „Kanto pri la Nibelungoj“, „Herroo en tigra felo“ „Kalevalo“.

„Kanto pri l'militiro de Igor“ estas verkita sub impreso de la malsukcesa militiro de la novgoroda-severeska princo Igor kontraŭ la kumanoj en 1185.

Ni ne scias la nomon de la aŭtoro, tamen ni vidas lin granda civitano, arda patrioto, zorgoplena pri la sorto de la Rusa tero, alvokanta al kunigo de la fortoj en batalo kontraŭ la malamiko.

Ni proponas al niaj legantoj fragmenton el „Kanto pri l'militiro de Igor“, kiun tradukis por publikigo nia leganto Vladimir Pacjurko el USSR.

KANTO PRI L'MILITIRO DE IGOR

(Fragmento)

La dua tago matene
la sanga aŭroro tagiĝon aŭguras;
nigraj nuboj el la maro iras,
volas ili plenkovri kvar sunojn,¹
kaj bluj fulmoj en ili tremas.
Estos fortega tondrado!
Pluvo el sagoj
venos flanke de la granda Dono!
Tie la lacoj rompiĝos
kaj la sabroj breĉetiĝos
kontraŭ kaskojn de la kumanoj,
ĉe la river' Kajalo,
apud la granda Dono.
Ho rusa tero, estas vi jam trans la monto!

Ventoj jen, Stribogaj² nepoj,
blovas el mar' per sagoj sur kuraĝajn
regimentojn de Igor.
Bruas la ter',
riveroj malklare fluas,
polvo la kampojn kovras,
la flagoj signas —
kumanoj iras de Dono,
kaj de l'maro,
kaj ĉirkaŭis ili la rusajn taĉmentojn.

Infanoj diablaj baris per krio la kampojn,
kaj la bravaj rusoj baris per ruĝaj ŝildoj.

Juntaŭro Vsevolod!

Staras vi je l'defendo,
ŝutas sagojn sur la malamikojn,
tondras kontraŭ la kaskoj per glavoj mortigaj.
Kien la taŭro saltkuras, per sia ora kasko
lumante,
tie kuŝas sur ter' amase fiaj kapoj kumanaj.

Frakasitaj estas per sabroj en flamo harditaj
la kaskoj avaraj³

de vi, juntaŭro Vsevolod!
Batalante li, karaj fratoj,
forĝesis pri l'vivo kaj gloro,
kaj pri l'patra tron' ora en urbo Ĉernigov,
kaj pri volo de l' bela edzino, Glebfilino,
ŝiaj kutimoj kaj moroj.
Estis iam bataloj kaj militiroj,
sed tian batalon neniuj vidis!
De frumateni ĝis la vespero,
de la vespero ĝis tagiĝo
flugas sagoj harditaj,
tondras sabroj kontraŭ kaskoj,
krevas lancoj mortigaj
en kamp' nekonata,
meze de l'tero kumana.
Nigra tero sub hufoj
estis per ostoj kovrita
kaj estis per sango surverŝita:
malĝojo ĝermis sur la Rusa tero.

Kio do bruas,
kio do sonas
tiel frue antaŭ aŭroro?
Revenigas Igor regimentojn,
ĉar kompatis li fraton Vsevolodo.
Batalis ili
tagon kaj la duan,
la trian tagon tagmeze falis la standardoj de
Igor.

Tie ĉi du fratoj disiĝis sur la bord'
de Kajal' rapidflua;
tie ĉi sanga vin' ne sufiĉis;
kaj festenon finis ĉi tie la bravaj rusoj:
boparencojn⁴ trinkigis
kaj mem pereis
pro l'rusa tero.

1) — t. e. la kvar rusajn princojn, partoprenantajn la militiron.

2) — Stribog en la slava mitologio estas la dio de vento

3) — avaro estis gento, kiu vivis de la V ĝis la IX jc. Sur la nordaj bordoj de la Nigra Maro kaj en Norda Kaŭkazo.

4) — temas pri la kumanoj — iuj rusaj princoj estis boparencoj kun ili

El la malnovrusa
tradukis: VLADIMIR PACJURKO

Al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ Graz, 1985. 06. 15.

Estimataj gesinjoroj!

La lasta numero de „Bulgara Esperantisto“ (n-ro 12/1984 — Not. de la Red.) aperis sub la titolo „Ĉu en la sistemo de UEA ekzistas Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj?“ artikolo subskribita de Ljubomir Miĥajlov, kiu enhavas tutan aron da malĝustajtoj.

Rilate al IEAJ mi deklaras jenon:

Malveraj estas precipe la asertoj, ke Ivo Lapenna „eligis“ IEAJ el UEA, ke IEAJ neniam eliris el UEA kaj „restis“ en UEA kun sia membraro, kun sia statuto.

Vero estas, ke en 1974 en Hamburgo la Jara Ĉefkunveno de IEAJ decidis la eksigon de la Asocio el UEA. La valideco de tiu decido estas ekster ĉia dubo kaj fakte ĝis nun ankoraŭ neniu eldiris dubon pri tio. Ankaŭ UEA mem neniam post Hamburgo konsideris la Juristan Asocion kiel plu aliĝinta. En la jarlibro de UEA la Asocio aperas eksplicite kiel „neligita al UEA“.

La frazo „Kvazaŭ IEAJ estis proprietaĵo de Ivo Lapenna kaj tute nature li povis ĉe sia eliro kunporti kun si sian proprietaĵon“ estas tre forta misprezento. Vero estas, ke prof. I. Lapenna, kiu estas internacie konata kaj estimata fakulo en sia scienco kaj — cetero — en la Esperanto-movado, havas la plej grandajn meritojn por IEAJ, kiu ŝuldas al li tre multe da danko pro lia lerta agado kiel prezidanto. Kvankam li mem jam plurfoje sugestis elekti alian prezidanton de IEAJ, tamen laŭ la peto de aliaj funkciuloj li konsentis esti reelektata plurfoje. Lia prezidanteco sĝinifas konsiderindan plialtigon de la prestiĝo de la Asocio.

Mi petas vin publikigi ĉi tiun leteron en la sekvanta numero de „Bulgara Esperantisto“.

Kun salutoj: D-ro KLAUS PERKO

NECESA KLARIGO

Reage al mia artikolo „Ĉu en la sistemo de UEA ekzistas Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj“ (BE, 1984, 12) d-ro Klaus Perko el Aŭstrio, en letero al la redakcio de „BE“ skribas, ke mia artikolo „enhavas tutan aron da malĝustajtoj“ kaj petas publikigon de la letero en „BE“. La Redakcio decidis, ke por klarigo de la afero pli utilis, se la prezento de la letero estus akompanita de komentoj kaj komisiis al mi ĉi tiun taskon.

1. En mia artikolo mi esprimis la opinion, ke IEAJ ne eliris el UEA.

D-ro Kl. P. asertas la malon. Li skribas:

„Vero estas, ke en 1974 en Hamburgo la jara ĉefkunveno de IEAJ decidis la eksigon de la Asocio el UEA. La valideco de tiu decido estas ekster ĉia dubo kaj fakte ĝis nun ankoraŭ neniu eldiris dubon pri tio. Ankaŭ UEA mem neniam post Hamburgo konsideris la juristan asocion kiel plu aliĝinta. En la jarlibro de UEA la Asocio aperas eksplicite kiel „neligita al UEA“.

Eliro de faka organizaĵo el la sistemo de UEA estas grava evento en la vivo de la organizaĵo. Ĝi estas ne rutina, sed eksterordinara akto. Ĝi estas vojkurbigo. Laŭidee ĝi estas proksima al malfondiĝo de la organizaĵo. Tia akto povas esti entreprenita nur surbaze de konsento de la plimulto — kaj ne ordinara, sed kvalifika — de la membroj de la asocio. Ĉu ekzistas tia konsento? Eĉ provo pri atingo de tia konsento? La incidenta decido de la kelkaj ĉeestantoj en la jarkunveno, sen anticipa inkludo de koncerna ero en la tagordo, sub la impreso de la neelekto de prof. Ivo Lapenna kiel prezidanto de UEA, ne povas esti valida decido por eliro. Ĉu ne evidentas, ke la decido estis solvo de la jena dilemo: aŭ en UEA, sed sen prof. Ivo Lapenna, aŭ ekster UEA, sed kun prof. Ivo Lapenna? Ĉu sub tiaj motivoj oni povas trakti asociajn problemojn?

La fakto, ke „neniu“ dubas, ne estas argumento. Ne estas argumento ankaŭ la fakto, ke „UEA mem neniam post Hamburgo konsideris la juristan asocion kiel plu aliĝinta“. Fakte, mia artikolo estas direktita, antaŭ ĉio, al UEA, kiu senpripense, sen necesa analizo, skribas en sia jarlibro, ke IEAJ estas „neligita al UEA“.

2. D-ro Kl. P. skribas plue:

„Vero estas, ke prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu estas internacie konata kaj estimata fakulo en sia scienco kaj — cetero — en la Esperanto-movado, havas la plej grandajn meritojn por IEAJ, kiu ŝuldas al li tre multe da danko pro lia lerta agado kiel prezidanto“.

D-ro Kl. P. pravas. Grandaj estas la meritoj de prof. Ivo Lapenna ne nur por IEAJ, sed ankaŭ por la Esperanto-movado. Sed ĉu pro la meritoj oni devas prisilenti la malmeritojn? Ĉu oni devas prisilenti la gravan kontribuon de prof. Ivo Lapenna por la nuna jurista skismo?

LJUBOMIR MIĤAJLOV



GEORGI AVGARSKI —

AMIKO DE INFANOJ

En siaj tridek libroj por infanoj la poeto kaj verkisto Georgi Avgarski pentras nian naturon, la vivon de la infanoj kaj de la laboruloj, la pasinteco de la patrujo kaj ĝiajn heroojn, la amikecon, primokas la malperfektaĵojn de junaj kaj plenaĝaj homoj.

Kun li ni estas malnovaj konatoj, kolegoj kaj samideanoj-esperantistoj. La motivo por nia renkontiĝo ĉi-foje estas la apero de lia nova libro, kiu enhavas tridek unu saĝajn kaj poeziplenajn fablojn. Jen fragmentoj el nia amika interparolo:

— *Kiel venis al vi la ideo pri via „Testudo al balo“? Malmultaj poetoj verkas fablojn — ja ne estas facile mokridi la homajn malperfektaĵojn.*

— Mi ne prenis specialan decidon pri tio. Mi komencis verki tiujn fablojn antaŭ multaj jaroj — jam en 1944 jaro.

— *Kiam vi estis infano, ĉu vi revis estiĝi verkisto?*

— Mi ne havis tiajn dezirojn. En la infanaĝo mi pentris ridigajn pentraĵojn.

— *Kio igis vin verki vian unuan versaĵojn?*

— Lerninte miajn lecionojn, en la libera tempo mi volis pentri ion ridintan, sed poste mi decidis: pli bone estas verki ion ridindan. Plej ridinda ŝajnis al mi la okazintaĵo kun Sando Sandica, vilaĝano, kiu tre ŝatis kapti fiŝojn kaj pro tio forgesis falĉi sian herbokampon. Pro tio lin priridis nia tuta vilaĝo Karaŝ.

— *Mi scias, ke estante kvarjara, vi restis orfo, sen patrino, sed ŝajnas al mi, ke vi ĉiam estis persista kaj laborema infano?*

— Jes, mia infaneco ne estis facila. Tamen mi ŝatis la librojn kaj multe legis. Precipe emociis min la romanoj de Mayne Ried, ankaŭ „Don Kihoto“ de Servantes.

— *Kial vi ne estiĝis pentristo?*

— Anstataŭ en la pentristan lernejon, mia

duonpatrino sendis min en Ĉerven Brjag por lerni ŝuistan metion.

Georgi Avgarski por momento eksilentis, rememorante sian senĝojan infanecon. Li denove vidis sin dektrijara knabo unuan fojon veninta en Sofio, ĉar amikoj en la ŝufarejo konsilis al li iri en la ĉefurbon kaj proponi en redakcioj siajn pentraĵojn.

— Tamen mi ne kuraĝis frapi al kiu ajn pordo, ĉar mi estis vera Gavroŝo. Por miaj lastaj dekkvar stotinkoj mi aĉetis varman platpaneton. Longe mi vagis tra la urbo, dormis en la urba parko.

— *Kiam por unua fojo vi aŭdis pri la Internacia Lingvo Esperanto?*

— Mi estis dekkvinjara, laboris en ŝufarejo en Sofio. Iun tagon la ejon eniris viro kun verda stelo subruste. Mi demandis lin kion signifas tiu ĉi insigno. Li klarigis al mi. Mi aĉetis la lernolibron de ADA kaj memstare komencis lerni Esperanton. Ĉiutage mi lernis almenaŭ po dek vortojn kaj fieris pri mia sukceso. Mia unua korespondantino estis Neli Van Bunnik — poŝtistino kaj pianistino el Nederlando.

— *Kiam vi ŝanĝis vian profesion?*

— En 1945, kiam mi revenis de la fronto post la fino de la Patrolanda Milito. En la armeo mi redaktis kaj ilustris ĵurnalon „Tranĉea Folio“. Poste mi laboris en la redakcio de ĵurnalo „Septemvriĉe“ kaj en la Bulgara Radio.

— *Kion vi dirus al mi pri via nova libro? Iuj fabloj jam estis elsenditaj per la Radio. Ĉu via malgranda nepo, kiu ofte akompanas vin, inspiras vin verki?*

— Mia nepo Kalinĉo finis la unuan klason en la nacia eksperimenta lernejo en Gorna Banja. Por li mi verkis la versaĵojn „Blanka Vintro“.

— *Ĉu vi ofte revenas en vian naskiĝvilaĝon Karaŝ?*

— Ĉiufoje, kiam mi revenas en mian vilaĝon, mi preferas resti sola. Ŝajnas al mi, ke mi interparolas kun la kamparo, kun la arbaroj.

— *Kion vi bondeziros al la etaj legantoj de „Bulgara Esperantisto“?*

— Dum la nova lernojaro lerni Esperanton kun granda amo. Tiu ĉi lingvo helpas ilin interkonatiĝi kun siaj samaĝuloj en la mondo.

LJUDMILA PASPALEEVA

NOTO DE LA RED.: Tiu intervjuo estas la lasta kontribuaĵo de nia longjara talenta kunlaborantino — ĵurnalisto, poetino kaj infanverkistino Ljudmila Paspaleeva. Nun ni publikigas ĝin lige kun la unujara datreveno de ŝia forpaso.

ARITMETIKO

Por kapabli ŝipojn gvidi,
la ĉielon fluge vidi,
oni devas multon povi,
en la kapon scion ŝovi.
Kaj en ĉiu ĉi okazo
vi memoru, ke fortika
kaj plej grava estas bazo —
la scienc' aritmetika!


Kial do al celo venas
ŝipoj, kaj direkton tenas
tra nebulo, tra tempesto
kaj obeas al ŝipestro?
La sekret' estas tre klara —
notu bone, ar' amika,
helpas al ŝipano mara
la scienc' aritmetika!

Por ke ni en ŝip' sagacu,
aviadu aŭ kuracu,
antaŭ ĉio tre necesas
scio kaj raci' — mi jesas.
Ĉar ekzistas ja nenia,
homokupa, profesia,
pli utila, pli unika
ol scienc' aritmetika!

Tradukis: LJUBA BOJAĜIEVA

*Tiun versaĵon ni prenis el la antaŭ nelonge aperinta libro „Amuza matematiko por ĝelernantoj“ de niaj samlandanoj — la esperantistoj el urbo Pazarĝik Ljudmila kaj Petko Arnaudov — profesiaj matematikistoj.

AMIKA E-RENKONTIGO



Esperantistoj-naturamikoj dum renkontiĝo en v. Borima. Foto: K. Kalčev

REZULTOJ DE LA

KONKURSO DE TART

Komence de la kuranta jaro la estraro de Tutlanda Amika Rondo de Tradukemuloj (TART) kun la aprobo de la estraro de BEA iniciatis konkurson pri traduko de unu el tri rakontoj de Ĉudomir: „Turistoj“, „Najbaroj“, „Kun klereco“. Ĝis la difinita templimo — la fino de monato majo, estis ricevitaj 11 (dekunu) tradukoj. Post detala analizo kaj tre atenta pritakso kaj komparo de la tradukoj la juĝkomisiono decidis aljuĝi jenajn premiojn:

UNUA PREMIO ne estas atribuita:

DUA PREMIO:

1. Kremona Băceva kaj Libertaria Mladenova el Sofio pro la rakonto „Turistoj“ — 40 levoĵ
2. Hristina Nikolova el Pazarĝik pro „Turistoj“ — 30 levoĵ
3. Ilija Iliev el Loveĉ pro „Turistoj“ — 30 levoĵ

TRIA PREMIO:

1. Todor Ŝoŝev el Sofio pro „Turistoj“ — 20 levoĵ
2. Nedka Valjaviĉarska el Sofio pro „Najbaroj“ — 20 lv.

La juĝkomisiono aljuĝis ankaŭ kuraĝigajn premiojn al:

1. Sabina Atanasova el Sliven pro „Turisto“ — libro
2. Ĉudomir Kantargiev el Sliven pro „Najbaroj“ — libro
3. Stefan Sokolov el Sofio pro „Kun klereco“ — libro

La juĝkomisiono gratulas la gajnintojn pro atingo de konsiderindaj rezultoj en la tradukarto kaj atentigas ilin kaj la ceterajn partoprenintojn, ke estas necesa plua obstina laboro por ke ili estigu veraj tradukistoj.

KIEL LABORIS LA JUĜKOMISIONO

Ĉiujn konkursaĵojn ricevis la estrarano de TART Veneta Baleva, kiu garantiis la anonimecon de la konkurso. Post tio ŝi transdonis kontraŭ subskribo la tradukojn laŭvice al ĉiu el la tri juĝkomisionanoj. Ĉiu tralegis kaj analizis memstare la tradukojn kaj transdonis siajn proponojn por premiado al Baleva. Tiuj proponoj ne estis sciigataj al la ceteraj membroj de la komisiono por ne influi ilin. Baleva aritmetike sumigis la proponojn. Ĉar en iuj pritaksoj estis konsiderindaj diferencoj la juĝkomisiono kunsidis la 22-an de aŭgusto 1985 kaj post analizo de la diferencoj kaj rekompato, kaj surbaze de la sumaj pritaksoj definitive ĝustigis la premiojn. Nur post tio estis malfermitaj la kovertoj entenantaj la verajn nomojn de la tradukintoj kaj kunmetita la listo de la premiitoj.

Tiamaniere la anonimeco estis komplete observata kaj estis garantiita maksimuma objektiveco de la pritaksoj.

VIOLIN OLJANOV
JUĜKOMISIONO: LIDIA RAEVA,
FLORI NIKOLOV

ENHAVO

D. Ĥitrov. Forta bulgara partopreno en Aŭgsburgo	II
**** Rezolucio de la 41-a kongreso de BEA	1
CV. MITEVA. En amika etoso	5
M. ANGELOV. Esperantistaj voĉoj en Moskvo	7
D. SIMEONOV. Kun junulara laborimpeto	8
Doc. C. KARDASEV. Antaŭ SVIEKO'86	9
O. CANKOVA. Renkonte al historia jubileo	10
M. JANKOVA. Ehoj pri nia kongreso	11
G. ĜAGAROV. Bulgario; Patria kanto	12
Verdaj steletoj: Georgi Avgarski — amiko de infanoj	15
Rezultoj de la konkurso de TART	III
Dezirata korespondi	IV



DEZIRAS
KORESPONDI

BULGARIO

Teodora Dragovska (17-jara, lernantino) — Sofio, 1220, kv. „Nadejda“ II, bl. 249 vñ. B, et. 7, ap. 41 — dez. kor. kun ĉl. pri muziko, sporto kaj naturaj sciencoj (hemio, biologio)

Milka Varnova (17-jara lernantino) — Ljubimec, dis. Haskovo, str. „Sofio“ № 27 — dez. kor. kun ĉl. pri historio, poezio.

Konstantin Pavlov (15-jara lernanto) — Sofio 1750, kom. „Mladost“ 1, bl. 18, vñ. 2, et. 3 — kolektas PM, BK, kalendaretojn, dez. kor. pri sporto, muziko kun socialismaj landoj.

Diana Mladenova (16-jara lernantino) — Svoĝe 2260, kv. Drenov, str. Sredna gora 47 — dez. kor. pri muziko, sporto, deklamarto.

Joanna Senj (11-jara lernantino) — Veliko Tŕrnovo 5000, P. K. 16 — dez. amikan korespondadon; interŝ. BK.

Vera Kirilova (56-jara) — Sofio, bul. „Georgu Dimitrov“ 125, vñ. A, ap. 7 — dez. kor. pri ĉl. kun ĉl.

HUNGARIO

Erika Kovacs (18-jara lernantino) — Budapeŝt 1131, str. Thälmann 22/c 118 — dez. kor. kun ĉl. pri muziko, literaturo, vojaĝoj, interŝ. BK.

POLLANDO

Magdalena Wroclawska (14-jara lernantino) — PL 63-820 Piaski, Grabonòg 62/1 — dez. kor. kun ĉl. pri literaturo; interŝ. BK kaj PM.

Anna Lewandowska (26-jara) — PL 02-495 WARSZAWA 122, ul. Kolorowa 8/3 — dez. kor. kun bulgaraj amikoj pri Joga, muziko, teatro, literaturo, turismo, folkloro.

Ludwik Zgirski — PL 87-100 Toruń, ul. Grudziadzka 61a — 16 — dez. kor. kun maljunaj bulgaraj esperantistoj (laŭ eble vegetaranoj).

FAMILIAJ ESPERANTO-KLUBOJ POR CENTJARIĜO DE ESPERANTO

Por omaĝi centjarigon de la Internacia Lingvo, membroj de la familio Worsztynowicz fondis familian Esperanto-klubon. Ĝis la jubilea jaro 1987 ili intencas atingi nombron de 100 familianoj, flue parolantaj Esperanton.

La familio Worsztynowicz kompilas detalan genealogion de sia gento. Ĝia gentopatro estis la muelisto Tomaso Orsztyń (Worsztyn), kiu en 1746 ekloĝigis en la urbo Gostyn (ĉ. 80 km sude de Poznań). Probable li venis el okcidenta Eŭropo kaj lia originala nomo povis esti Ornstein aŭ Wornstein, jam en 1761 aldonigis al lia nomo la finaĵo „owicz“.

En la 19-a jarcento la familia nomo estis ofte mise skribata kaj nuntempe diversaj branĉoj de tiu familio nomigas: Worsztynowicz, Bursztynowicz, Orsztyńowicz, Ostynowicz, (Vorŝtinoviĉ, Burŝtinoviĉ, Orŝtinoviĉ, Oŝtinoviĉ). Ĉiuj personoj kun tiuj nomoj, vivantaj ie ajn en la mondo, estas idoj de la muelisto Tomaso. Se loĝas ankaŭ en via regiono, kontaktigu ilin kun la familio en Pollando. Sur genealogiaj tabeloj estas registritaj ankaŭ idoj en inaj linioj, tial multaj familianoj portas aliajn nomojn, tamen ĉiujn ligas deveno de la komuna gentopatro.

Ĉiujare multaj membroj de tiu gento partoprenas la Familian Feriadon „Esperanto hejme“ en Miedzygorze (en 1983 — 25 personoj, en 1984 — 40 personoj) kaj jam pli ol 50 familianoj konas aŭ lernas la Internacian Lingvon. En junio 1984 Eleonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznań disertacion pri Esperantaj bibliotekoj.

Nuntempe vivas ĉ. 4000 posteuloj de Tomaso apartenantaj al la sesa ĝis deka generacioj. Ili loĝas ĉefe en Pollando, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj (Aŭstralio, Britio, Francio, FRG, GDR, Kanado k.a.). Personoj, kies antaŭuloj ĉ. 1900 elmigris el Pollando, plejparte ne konas la polan lingvon.

Ĉu ie en la mondo ekzistas familioj, kiuj kompilas siajn genealogiojn kaj intencas fondi familiajn Esperanto-klubojn? La familio Worsztynowicz volonte renkontigos en Miedzygorze kun ili. Adreso: Familio Worsztynowicz, P.O. Kesto 311, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando.

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVSANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr, HAĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-16

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1000 Sofio